

## ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
WYDAWCAREDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZYAPERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI  
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.*Kurantaj ĉagrenoj.*

Fine de aŭgusto en 1935 post du jaroj de foresto mi vizitis dum kelkaj tagoj Varŝavon. Kompreneble, mi zorgis pri tio, ke mi kolektu informojn pri la movado en ĝi dum la kuranta periodo.

Malĝoja situacio! Ĉio preskaŭ velkas. Kie antaŭe regis vigla vivo, nun regas silento.

Ekzistas personoj, kiuj kun konsterno en la okuloj rigardas tion ĉi, kio ĉirkaŭ ili okazas. Tiom multe da laboro, kaj tia, preskaŭ neniam, efiko! Kio okazis? Kien ni fine marŝas?

Bedaŭrinde, en aliaj landoj ne estas tro alie. En Germanujo malfavora por ni agordo en la tiea registaro ĉion lamigis. Alie lamigis esperantsmon la krizo, kiu instruas la homojn pensi pri la mono kaj pano, ne pri la idealaj demandoj.

Tiuj el samideanoj, kiuj bezonas sentan subtenon, forlasas niajn vicojn. Aliaj rigide fermas la buŝojn. En iliaj okuloj oni legas bedaŭron, ke tiom da tempo de sia vivo ili oferis por la semado, el kiu nenio elkreskas. Ilia silento pli multe diras, ol iliaj parolantaj buŝoj. Estas re-esperantistoj, kiuj kun ridetanta vizaĝo diras triumfe: „jen kio okazis! Mi jam tion ĉi de longe profetadis“. La samaj personoj en momento de triumfo de esperantismo estus deklarintaj: „Mi jam de longe antaŭdiris, ke esperantismo venkos!“

Sed ili nenion faras por tiun ĉi venkon pliproksimigi. Ili ludas la rolon de muŝoj kaj tabanoj malhelpantaj al semantoj.

Kion opinii pri la kuranta situacio?

Jen mia opinio:

Tradaŭri kun serena mieno la malfavoran periodon postulas malmolan karakteron. La malfortuloj nin certe forlasos.

Ĉiam tiel estis. Veraj kavaliroj, leonkoraj kavaliroj de verda stelo batalos obstine ĝis la fino de sia vivo, se eĉ ili ne povos vidi la finan venkon de esperantismo dum ilia vivo. Ili scias, ke oni vivas ne nur tiel longe, kiel oni korpe vivas, sed ke, ankaŭ post la morto vivas kaj disvolviĝas la ideoj de homoj mortintaj.

Estas do por mi egale, ĉu mi ĝisvivos finan venkon de esperantismo, mi tamen povas facile al mi prezenti tiun ĉi gloran periodon. Mi jam nun vivas en ĝi, mi ĉerpas el ĝi la forton, la sentan subtenon, konsiderante la nunan periodon, kiel ion trapasan, momentan, post kiu venos la brila, glora estonteco.

Sed aliflanke oni ne povas lasi ĉion kaj vivi per ia fatalismo, ke io nepre venkos, sendepende, ĉu ni laboros ĝis trasingumo de la cerbo, aŭ ĉu ni eĉ ne movos la fingron en la boto. Fatalismo estas falsa taktiko. Estas sufiĉe da bonaj ideoj, kiuj tute ne venkis, kvankam povus venki, se ili trovus taŭgajn laborantojn kaj progresigantajn de ili.)\*

Sed kiel proksimigi tiun ĉi venkon?

Estas klare, ke nure per la kursoj ni nenion grandskalan sukcesos fari. Mi pri tio ĉi jam en 1931 avertis (nr. aprila kaj maja p. 53—56, 68—70) en artikolo: „Minacas krizo“. Tamen oni ne volis kredi. Oni skribis al mi „nenia krizo minacas“. Nun, kiam la krizo estas nereebla, oni ne

\*) Ekz. pres-arto en antikveco tute ne eltrovita, malkovro de Ameriko, kiu okazis ne pli frue ol en 1492, kvankam Romanoj povus ĝin malkovri.

povas plu diri, ke la krizo re minacas, ĉar ĝi jam reĝas.

Dum nuna epoko niaj ĉefaj celoj devos esti zorgo, ke oni, se estos eble, konservu minimume la ĝisnunan staton de la esp. movado. Sed eĉ tio ĉi ne estas ebla, ĉar niaj vicoj jam malgrandiĝis.

Do kion fari? Per kio ni disponas?

Ni ne estas laboristoj kaj ne posedas la organizaĵojn similajn al iliaj. Ili en okazo de la nesufiĉa salajro povas striki kaj postuli pli grandan salajron. Pro tio, ke la laboristoj estas necesaj, oni plialtigas al ili la salajron.

Ni ne povas senlabori. Se ni senlaboros, nia ideo malvenkos.

Ni ricevas nenian salajron. Se ni ion postulus, oni priridus nin.

Situacio estas do alia.

Laboristoj estas necesaj. Ni necesaj ne estas en la sama senco, kiel ili. Ekzistas eĉ personoj, kiuj diras, ke ni ĝenerale ne estas necesaj kaj ke benata estu la tago, kiam ni malaperos.

Malantaŭ ni staras nenia nacio. Ni reprezentas nur nin. Se ni ion petas, ni tiam ĉi faras nur en nia nomo. Se ni estas malmultaj, oni povas nin priridi, sed ni ne povas diri, ke ni elpaŝas en la nombro de io, kio ekzistas efektive.

Malgraŭ tio ni volas altrudi nian volon al milionoj.

Nia sola armilo estis logiko. Ni volis konvinki milionojn da homoj, ke estus pli bone, se ĉiuj homoj parolus du lingvojn perfekte (nacion kaj internacian), ol multajn.

Ni ĝojus, se ni venkus iun per tiu ĉi logiko kaj povus lin enkalkuli en niajn vicojn. Sed oni forĝesis, ke ne sufiĉas konvinki iun, sed ankaŭ envicigi ĝin en la armeon de personoj, postulantaj Interŝtatan Esperanto-Akrodon. Tion ĉi oni ne faris. Tio ĉi estas peko de nia movado.

Oni volis per la kursoj ekposedi por esperantismo kiel eble plej multe da personoj kaj oni tre ĝojis kaj nomis „granda venko“, se oni akiris eble 50 novajn adeptojn, sed neniam pensis pri tio, ke ni per tia taktiko neniam varbos milionojn, el kiuj konsistas la nacioj.

Ni ŝanĝu niajn postulojn! Ni ne provu esperantigi ĝis perfekteco la kursanojn sed ni provu ilin konvinki, ke nepre estas Interŝtata Esperanto-Akordo pri samtempa enkonduko de esperanto en minimume 6 ŝtataj plej konvene en meza Eŭropo inter Finlando kaj Grekujo.

Unua grava paŝo por proksimigi tiun deziratan periodon estos konvinki esperantistojn, kiuj mem ne scias, kion ili devas postuli. Pro tio, ke ili nenion postulas, ni ankaŭ nenion ricevas.

Poste, kiam ili estos konvinkitaj pri neceso de tiu ĉi postulado, ili kolektu subskribojn. Se tio ne okazos, ni neniam kreos sufiĉan forton. Estos simile kiel nun en Germanujo kun ministro Goebbels, al kiu sin anoncis iu ne-germano, demandante, ĉu li konas esperanton. La ministro respondis, ke esp. estas lingvo internacia, kaj internaciecon oni persekutas en Germanujo en ĉiu formo. „Ni estimas la naciojn, sed ni ne toleras la internaciecon“. Kaj fine li aldonis: „Ĉu vi ne opinias, ke la arte farita lingvo estas io monstra? La fremdulo respondis ke ĝin oni povas facile ellerni. Sed ministro Goebbels respondis je tio: Sed finfine oni devas ĝin lerni, kiel ĉiun fremdan lingvon. Sekve pli preferinde iom pli elstreĉi la memoron por ellerno de lingvo natura. En la lastaj tempoj tre disvastiĝis la kono de la angla lingvo en la mondo. Ĉu vi ne farus pli bone lernin'ge anglan lingvon? Elektante inter la lingvo de Zamenhof kaj la lingvo de Shakespeare vi ne devas ŝanceliĝi. Mi vin adiaŭas“.

Jen ni vidas, kiel ekaperas la ideo pri internacia lingvo en la spirito de respondeca kaj influema ministro de kultura nacio.

Post preskaŭ duono da jarcento de propagando de esp. ni trovas la homojn, starantajn en la registaro de granda nacio, kiuj havas preskaŭ neniajn ideojn pri la strukturo de lingvo internacia. Sinjoro ministro G. estas kontraŭ ĉiu „internacieco“, sekve ankaŭ kontraŭ metra sistemo de mezuriloj kaj kontraŭ ĉiuj internaciaj konferencoj. Ne estas vero, ke angla lingvo disvastiĝas pli kaj pli sur la tuta tero. Laŭ kiu statistiko oni povas tiel aserti? Eble apogante sin sur la statistiko, kian ĝis nun neniu faris? Se eĉ angla lingvo estas de multe da ne-angloj komprenata, ĝi korekte ne estas uzata, sed kiel ĵargono. Naskita anglo hontus tian lingvon. Tial ni efektive ne ŝanceliĝas inter elekto de angla kaj Zamenhofa lingvoj. Ni elektas esperantan por internacia, anglan por angla kulturo.

Sed tiuj ĉi azenecaĵoj pravas, ke nia propagando ne atingas iajn homojn. Tial la homoj, kiuj estas konvinkitaj pri la taŭgeco de esp. kiel lingvo internacia plej bone farus, se ili organizus sin, kaj sian homogenan opinion prezentus al la registaroj, kiel postulo de partopreno de tiu ĉi registaro en Interŝtata Esperanto-Akordo.

Dr. Antoni Czubryński

Ostrowiec Kielecki, Sierkiewicza 53, m. 8.

Korekto: en mia artikolo en nro 8—9, 1935 paĝo 101, linio 29 de supro anstataŭ pentr-arto devas esti pres-arto.

## 23-a Japana Esperanto-Kongreso, Nagoja. Rezolucio pri Gramatiko, Stilistiko, Vortaro.

„La 23-a Japana Esperanto-Kongreso kunveninta en Nagoja esprimas la konvinkon, ke nia lingvo Esperanto estas komuna posedaĵo de la tuta homaro. Nia Esperanto-Movado estas esence lingva afero kaj orientanoj estas speciale interesataj en la tutmonda karaktero de nia lingvo. Estas do memkompreneble, ke ni, orientaj esperantistoj, faras la sekvajn proponojn:

1) Estas dezirinde aperigi provon de detala Esperanto-Gramatiko, kiu estu kvazaŭ moderna eldono de la Lingvaj Respondoj kaj sur kies bazo estos verkataj ĉiuj naciaj lernolibroj. Tutmonda helplingvo, kia estas nia Esperanto, devas posedi tian vastan bazon, sen kiu miskomprenoj estas timeblaj. Kompreneble la reguloj de tia Gramatiko ne devas esti absolute rigidaj, nek ili ĝuos la saman aŭtoritatecon kiel la Fundamento. Tia Gramatiko servu do kvazaŭ kom-paso al dubantoj tute same kiel detalaj gramatikoj de nacilingvoj por fremdaj studentoj.

2) Estas dezirinde aperigi Esperanto-Stilistikon, kiu estu kvazaŭ moderna eldono de la Krestomatio. Internacia Lingvo devas havi internacian stilon. Kompreneble unuformeco de stilo ne estas dezirinda. Tamen, komencantoj bezonas ekzemplojn de bona stilo kaj konsilojn por la akiro de tia stilo. Ĝis nun Stili-

stiko estas kvazaŭ orfa infano en nia literaturo, eĉ la vorto mankas en la vortaroj — dume ekzistas „poetiko“. Tien ĉi apartenas kritiko pri mallogikaj esprimoj nekompreneblaj al orientanoj, kiujn okcidentaj samideanoj facilanime uzas. Ni gardu la purecon kaj la internaciecon de nia stilo.

3) Estas dezirinde aperigi Kompletan Vortaregon de Esperanto, kiu tamen ne estu oficiala sed nur provizora. Sur la bazo de tia aŭtoritata Vortarego devos esti ellaborataj la naciaj vortaroj en la estonto. Eldono de Oficiala Radikaro estas ankaŭ dezirinda.

Pri la aperigo de la supraj ne-oficialaj verkoj devas zorgi, laŭ la opinio de la Kongreso niaj oficialaj institucioj (Akademio, Lingva Komitato, U. E. A.) kun la helpo de ĉiunaciaj fakuloj por ke la internacia karaktero de la entrepreno estu certigata. La Kongreso estas konvinkita, ke tia programo donos al nia Movado sanan direkton, kiu forturnigos la atenton de bagatelaj ludoj per neologismoj kaj alproksimigos nin al la venko, pri kiu neniu dubas. Vivu nia „tutmonda“ lingvo, vivu la interkontinenta kooperado lingva, manpremon al ĉiuj kunbatalantoj sur la bazo de l' Zamenhofa Fundamento!”

Gazetoj estas petataj represii.

## LA ĜEMELOJ - REVOLUCIOJ.

Laŭ historia kongruenco estis tio, ke Francujo, kiel unua, oficiale rekonis Sovetion, ĉar preskaŭ ĉiu etapo kaj multaj al la ĉefroluloj de la franca revolucio trovas sian duplikaton en tiuj de la nuntempa Rusujo. La nedecidema, hejmama caro kaj lia kuraĝa, maldiskreta, obstinkapa edzino povus estis reenkar-niĝoj de Louis kaj Marie Antoinette. Kerenski, en rimarkinda grado, similas al Danton. Girondins frazumadis denove ankoraŭ en la Duma, kaj Montagnards en la Laboristaj kaj Soldataj Komitatoj. La burĝaro, kiu venkis la revolucion de 1905 j., trovas sian prototipon en la enciklopedistoj francaj; Ĉajkovski, Kropotkin kaj Tolstoj estis slavaj Rousseau'oj.

„New Russia“, de Anatole de Monzie, ne substrekas tiujn memevidentajn analogojn, sed ĝi emfazas en la brila unua ĉapitro, ke, ĝuste kiel Louis XIV

neevitebligis revolucion en Francujo, tiel samfaris Petro la Granda respektiva en Rusujo.

Francoj ĉiam montriĝas profetoj tre trafaj, kiom koncernas la irojn de Rusuja ŝtatpolitiko. Rousseau, en la Socia Kontrakto, opiniis, ke Petro, anstataŭ polici siajn regnantojn, devus dresi ilin kun milita celo. Condillac, amiko de Rousseau, vidis danĝeron en la ŝajna trankvilo kaj paciencemo Rusuja; li kredis kun Tacitus, ke tiuj manifestaĵoj en ŝtato simptomas la venon de kataklismoj teruraj. Napoleono asertis, ke „antaŭ ol forpasos kvindek jaroj giganta socieksplodo, forfumiĝinte, lasos Rusujon respubliko“; ne pro manko de konspiruloj kaj iliaj buŝoj, kiel Puŝkin, Gogol kaj Turgenev, montriĝis, ke lia tempotakso postrestis ankoraŭ kvindek jarojn.

Ĝuste ĉar la francoj pensas logike kaj

mem travivis periodojn de socia idealismo, ili sintenas skeptikeme kontraŭ la pretendoj de la nunaj rusoj. Il' vidas en soveta puritanismo nenion pli ol reviviĝon de sia propra Regado de l' Virto, kiu finiĝis per tio, ke la mondo rigardis francan burokratecon sinonima kun korupto. „Ni konstruas novan vivon por nova homo“, skribis Sabsovitch, unu el la kreintoj de la Gosplano. „La francoj“, diris Robespierre, „jam antaŭas la ceteron de la homspeco je 2000 jaroj. Ili estas aparta speco“.

La signifo de „First to go back“ (U-rua Reveninto) kuŝas en tio, ke la aŭtorino, s-ino Blakeslee, eksa honorservisto de la carino, estas nun konvertita al Sovetismo. Ŝi estis Grafino Irina Keller, rifuĝinto, edzino de Usonano. Dek jarojn ŝi ne vidis Rusujon, sed en 1932 ŝi kaj la edzo ricevis permeson viziti tiun landon. Ŝi tie entuziasmiĝis pro la venkoj de Stalin en la nacia kampo, samkiel multaj rifuĝintoj de antaŭ tempo pro franca naciismo sub Napoleono.

S-ino Blakeslee verkas en la eferveska humoro de homo, babilanta al bonamikoj, dum ŝi reesploras la malnovan hejmon. Ŝi kaj edzo iris ĉien... Leningrad kaj Moscov, Ukraino kaj Nordkaŭkazo, Krimeo en sudo, vivokule demandante kamparanojn kaj aliajn, tradukante respondojn por la edzo, ravita ŝi estis de ĉio, kion ŝi aŭdis. La ŝanĝoj ĝojige ŝokis ŝin... klinikoj, lernejoj, konstru-planoj, komunaj manĝoj, novaj leĝoj pri-

geedzaj. kiuj lastaj forigis la prostitua-don. „Ne plu bezono por tio“, simpla-nime informis komunisto. „Ni nun pre-fere geedziĝas“. Ankaŭ ĉarmis la poli-tikaj mensoj de la gejunuloj, kiuj jetas inter si la frazaĵarojn de Marksismo.

Sed estis melankolia fakto, ke la so-veta atingajo, kiu plej impresis ŝin, tio estis la Armeo. La armeo de Napoleo-no... jen kio igis milojn da elmigrintoj rifuĝaj nek rojalistoj nek Jacobins nek Girondins, sed francoj: kaj venis tem-po, kiam la Marseillaise movis al ili la korojn same kiel la Internacio al s-ino Blakeslee antaŭ du jaroj.

Ĉe giganta parado de infanterio, ka-valerio, artilerio kaj tankoj preteranta la tombon de Lenin, ŝia fervoro flamiĝis ankaŭ al la edzo, kiu kontribuis kelkajn ĉapitrojn al ŝia libro. „Ni havas la plej fortan armeon en la mondo“ bolŝeviko informis, antaŭ la parado, kaj kredi tion li baldaŭ kredis facile.

„Komandoj eksonoras. La Ruĝa maso onde ekmoviĝas. Ĝi svingas ek en akti-von! Linioj rektaj, vizaĝoj viglaj, bajo-netoj pikakraj, ĉiuj en perfekta ritmo paŝadas en revuo antaŭ ni“.

Eble, ke la militista dresado de la rusoj venkos ilin. Se jes, Eŭropo tre povos sperti suferojn multoble pli dolo-rajn ol ĝi devis dum la militiroj de Na-poleono.

R. Banham, Melbourne, Viktorio,  
Aŭstralio.

STANISŁAW PRZYBYSZEWSKI.

## EL „CHOPIN KAJ LA NACIO“.

Estis alveninta tempo, kiam la animo de la potenca poeto pro nemezurebleco de sufero de sia nacio gigantigis tiun, kiu al Dio estas egala, kun furiozeco bategas per pugnoj pordegojn de Destino kaj krias malespere: Kial? Kial?

Eli, Eli lama sabahtani?

Kial Vi forlasis nin, Sinjoro?!

Kaj tia unu, terurega krio: Eli, Eli lama sabahtani? — estas plej potenca esprimo, kiun la animo de la nacio eltrovis por sia nemezurebla doloro:

Fis-mol Polonezo de Chopin.

Kun kio oni povus kompari ĝin?

En la tuta potencega pola arto mi ne povas trovi konvenan ekvivalenton. Per potenco de inŝpiro ĝi staras sur sama nivelo kiel „Improvizacio“ de Mickiewicz, sed transetendas egoistan doloron al sufero de miliono, per artista forto ĝi superkreskas tutan verkon le Grottoer... U-

nu eble simbolo troviĝus en pola pentro-arto:

Rejtan sur pentraĵo de Matejko — surdorse etendita en disŝirita ĉemizo, per akraj ungoj de siaj fingroj en karno sia engratita kaj per granda krio vokanta:

Mi ne permesas!

Kaj kune malespera krio al Dio: Kial?

Kaj per furioza, abrupta unua takto de sia Polonezo — de martireca opopeo — Chopin vokas: Kial?

Kaj tiu demando ankoraŭ pli laŭta, pli minaca... kvazaŭ kaŭranta al frakasonta salto spiregas la „Kial?“ — ĝis fine ĝi eksplodas per tuta uragano de krioj, kiuj kunfandiĝis en unu, unu sangan, ŝaŭmigitan demandon: kial, kial, kial Vi forlasis nin, ho, Sinjoro?!

Momento de silento.

Nenia respondo.

Homo trankviliĝis. Kaj lia animo ek-

tondris per ia gigantega, heroa, solena tono, per kanto pro doloro de liberigita animo, kiu maturiĝis al sia Destino, kiu sen timo kaj sen teruro, kun furioza, minaca kuraĝo rigardis fantomajn, pri siaj sekretoj certajn okulojn de sfinkso, sed vane... Kaj tamen timon li suferis, li volus disŝiri ĉiujn sigelojn, kaj ili estas netuŝitaj:

Vivo nek ĉesis esti enigmo, nek morto granda timego kaj mistero, kaj en spireganta doloro homo ĝemas tiun teruran: „Kial?“

Kaj terura ploro krevigas lian bruston, malespera ĝemo de agoniantoj, kiuj vivon ne bedaŭras, nur sole tion, ke ili ne povas pli longe batali. Sed denove kun duobligita forto eksaltas sur piedojn, refoje kun duobligita forto atakas fermittajn pordegojn de perdita paradizo, kaj en terura, disŝiranta dolormuĝo agorias tiu malespera penego.

Kaj de malproksimo kvazaŭ resonado de sanga batalo-huffrapado de ĉevaloj, obtuza tondro de kanonoj, brutremo de kampo sub pezaj piedoj de rigoraj kvaruloj (aroj de kvara regimento) — fantaziigis preĝoj por agoniantoj, petegaj petoj al Estro de Taĉmentoj, ĉiam pli mallauĝigas en malproksimo tumulto de batalo, kaj subite, kvazaŭ ia sankta rozo mistika, elfloras el malesperaj suferoj, el furioziĝintaj preĝoj, el sovaĝa haoso de batalo mazurko, en kiu genio de Chopin en senkzempla potenco esprimis tiom sinceran, tiom naivan poezion de la nacio, kiu kun vigla kanto, kun rondforma mazurko je buŝoj iris al sanga danco.

La kortuŝa kanteto ulana: „Tam ra błoniu błyszczy kwiecie“ (Tie sur herbejo brilas floraro) asociiĝas kun fiero: „Taki los wypadł nam, że dziś tu a ju ro tam“ (Tia sorto okazis al ni, ke hodiaŭ tie ĉi, kaj morgaŭ tie), aŭdiĝis en antaŭinfero fieregeco de polo, kiun satano ne volas enlasi, ĉar li skribas sur inferan pordegon, ke Polujo ankoraŭ ne pereis kaj ĝemis kvietan kanteton pri kompatinda patrujo: „Lecą listki z drzewa, co wyrósło wolne“ (Flugas for folietoj de l' arbo, kiu elkreskis libera) — ĉio — ĉio tie estas — kaj kantojn de tiuj ĉiuj hodiaŭ jam forgesitaj Tirteoj, kiuj per plej esenca tono de l' animo de nacio — mazurko — instigis siajn fratojn por batalo, Chopin senmortigis en tiu ĉi unu, nekomparebla, per potenco de sia inspiro timiganta mazurko.

Sed tio ĉio estas sonĝo, kaj post ĝi terura vekigo. Denove komenciĝis la timiga meso de malespero, kio finiĝis jam

en komplete frenezo de doloro. La fino de tiu dolorega epopeo de ĉiuj turmentoj, kiujn la heroa gento per superhomaj penegoj travivis, tio jam estas malakriĝintaj murmuroj de senfina doloro, kiun oni jam ne povas imagi al si, de doloro ekster ĉia doloro. Kaj ŝajnas, ke jam ĉio silentiĝis, ĉio por ĉiam mortis, jam oni elportis lastan ĉerkon... kaj nun subite lasta penetranta krio, kvazaŭ tondro de fina Juĝo. Tiu lasta *f i s*, sub kiu dum furiozo de krea vizio la tremanta mano de Chopin kvarfoje subskribis „forte“, tiu estas unu el plej kuriozaj enigmoj de lia kreado. Tiu ĉi subita, penetranta krio, pro kiu haroj hirtiĝas, tiu estas la lasta ĝemo de rompita koro, aŭ eble tondro laŭta, potenca impulso al nova batalo?

Traduko de Bogdan M.  
(Poznań)

### *Kial mi ne kisas vin?*

Kial mi ne kisas vin?  
Nubon kisas ja la monto; —  
kis' de via buŝo sole  
min allogas en la mondo.

Unu kison cedu nur!  
Papilio kisas floron; —  
kis' de via buŝ' fruktigos  
mian sekiĝintan floron.

Al mi aletendas ŝi  
sian kapon kun kortuŝo,  
kaj mi premas amokison  
sur rozruĝa ŝia buŝo.

Ĉiuj steloj, kiuj ĉe l'  
vasta firmament' radias,  
ja pro tiu kiso de la  
ĉarmulino min envias.

Jan van Schoor.

**WAŻNE DLA SZKÓŁ I SAMOUKÓW!**  
Już ukazało się II-gie wydanie aprobowanego przez Ministerstwo W. R. i O. P. podręcznika esperanckiego p. t. „LEKCJE JEZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO“ — w opracowaniu prof. Sygnarskiego z przedmową prof. uniw. dra Bujwida. Cena podręcznika, zupełnie zmienionego, znacznie rozszerzonego i zaopatrzonego w dwa słowniczki — tylko 2 zł. Do nabycia w Administracji „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. (Konto PKO 406.660) lub w „Naukowym Kole Esperanckiem“, Bydgoszcz, plac Wolności 9. (Konto PKO 141.787).

## LINGVA ESPLORO.

De s-ano Bernard Long el Londono mi ricevis jenajn rimarkigojn pri esti en stato:

„Pri viaj diraĵoj sur paĝo 103 de P. E. eble vin interesos, ke en la angla lingvo, almenaŭ, ni uzas la esprimon „...ne estis en stato pagi“. Sed ĝi estas iom pli forta ol „ne povis pagi“ kaj iom formala kaj peza. Ĝi estas same kiel en afero de (ekz.) **malsano**, kiam ni povas diri „la paciento ne estis en stato paroli“, k.t.p., anstataŭ „ne povis paroli“. (La efektiva angla vorti en la cititaj esprimoj estas **condition**, sed ĝi ĉi tie signifas **stato** kaj ne (kiel aliloke) kondiĉo). Kaj pri la paciento, almenaŭ, oni povus egale korekte diri **state**.

Tamen mi ne deziras subteni uzadon de tiaj frazoj en Esperanto, almenaŭ en la kazo de „en stato pagi“. — Sed, kontraŭe, mi ne volas tute kondamni ĝin, ĉar, supozeble, eĉ se iom peza, ĝi estas logike komprenebla.

La cetera parto de la letero de s-ano Long pledas por la formo „**Varsovio**“ (ne: Varŝavo), ĉar „**Varsovio** uziĝis jam dum 40 jaroj kaj tutmonde disvastiĝis“.

La rimarkigoj de s-ano Long interesos multajn, jen kial mi citis ilin.

Nun mi transiras al esplorado de la numero julia de P. E. 1935.

„Sen troa elspezigo“ uzita pri persono ne ŝajnas korekta. Sufiĉas: elspez(ad)o.

Ankaŭ „pretemo“ en „esprimi sian pretemon prelegi“ ne estas necesa. Sufiĉas la pli simpla: preteco.

En la frazo: postkongresa tempo bonŝance **antaŭeniras** la aŭtunan agadsezono, al la skribinto okazis plumeraro, anst.: **antaŭiras**.

„Multaj embarasiĝas pro trovo de konforma somerrestadejo“ esprimas la rektan kontraŭon de tio, kion la skribinto intencis. Se li skribus: **pro netrovo**, ĉio estus en ordo... Tial anstataŭe mi preferas: **pri trovo**.

Anst. „nun ni trairu al...“ (bildesprima) preferindas: nun ni transiru al. Temas pri transiro al alia temo.

Anst. „tio mem sufiĉus por ke ĝi estu vizitinda“, la „mem“ ŝajnas pleonasma. Eble preferinda estas: tio jam sufiĉus ktp?

„La turistaj valoroj de Truskawiec **kuŝas** ĝuste en ĝia situo“ — tiu ĉi frazo uzas kuraĝe „**kuŝas**“, anst. ĝis nun uzata „**konsistas**“.

\*

Anst. „je invito de“ pli bona estas: laŭ **invito**.

Anst. „la naturbelecoj de Pilica“ devas esti: la naturbelajaĵoj.

Oni ne povas en prospekto skribi: ĉiu veturinto ricevos 50%-rabaton! Sed, kompreneble, „veturanto“ aŭ „vojaĝanto“.

\*

Mankas la finaĵo -n la frazo: „aliformis ilin en miriga kolorplena belo. Cetero, laŭ mia opinio, sufiĉas: aliformis.

Oni ne devas trouzi la t. n. poezian liberecon dirante:

„La jaroj pasis kaj **junulo ŝanĝis la infanon**“.

Devas esti: anstataŭis, Sed, se oni ne pre volas resti ĉe la pli poezia radikoj **ŝanĝ'**, la frazo povas teksti nure:

Pasis jaroj, la infano **ŝanĝiĝis** en junulon, aŭ: **junulo fariĝis** el la infano.

Kion signifas: 43 ĉambroj miksaĵoj voĉdonis favore al Esperanto? Eble: diversaj?? (El la la teksto, kiu parolas pri **komercaj ĉambroj**, nur tio povas esti la ĝusta senco de tiu ĉi stranga „miksa“).

„La ĉeestintaro aŭskultis“ (en Pollanda Kroniko) penas kontraŭ la logiko. Kiel povis aŭskulti tiuj, kiuj ne plu ĉeestis!? D. e. la ĉeestantaro.

Anst. „sub la akompano de“ mi preferas: **akompane de**. Oni povas diri: „sub la komando de“, sed ne „sub la akompano. Kvankam **ambaŭ** estas ne tute kaj perfekte logikaj, tamen „sub la komando“ estas pravigebla almenaŭ per la fakto, ke en diversaj eŭropaj lingvoj oni diras tiel.

\*

Nun el la numero 8—9 de P. E. mi kaptis jenajn rimarkindaĵojn:

„Mi revenas de kongreso, kiu ĝis nun ankoraŭ neniam okazis“.

Estas plumeraro, verŝajne. Ĉar alie, kiel oni povus reveni de kongreso, kiu **ne okazis**?!

Kompreneble, devas esti: **kia**.

Anst. „oni imagis al si“, sufiĉas: oni **imagis**. Ĉar oni ne povas **imagi** al iu alia. (Oni povas **imagigi** al iu alia!).

Anst. „en la **interrilato kun** la alproksimiĝanta 50-jara jubileo de Esp.“, (pole: w związku z) mi proponas: konsiderante la... 50-jaran jubileon de Esp., laŭ la sugesto de s-ano Orzech (P. E. okt. 1935).

\*

Anst. „ni tute ne sentiĝis kiel fremduloj“, d. e. ni tute ne **sentis nin** (kiel) fremduloj. Alie la frazo havas tute ne volitan signifon: oni ne **sentis nin** kiel fremdulojn!...

Anst. „multe imponis nin la Huculi“ d. e. la Huculoj. La aŭtorino de la arti-

JARO 1935

# ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, UL. LUBICZ L. 34,

REDAKTANTOJ:

PROF. DR. ODO BUJWID — TADEUSZ HODAKOWSKI

RESPONDECA REDAKTORO: DR. LEON ROSENSTOCK

ADMINISTRANTO: LUDWIK KUTSCHER

### KUNLABORINTOJ:

Prof. Dr. Ajdukiewicz (Lwów). — Józef Alfus (Kraków). — R. Banham (Melbourne). — Dr. Leo Belmont (Warszawa). — Hermina Bertizanka (Kraków). — Prof. Tadeusz Biliński (Kraków). — Lola Blankówna (Lwów). — Józef Bociek (Ćmielów). — Bep Bresler (Werkendam). — Bolesław Czechowski (Susiec). — Inż. M. Chmieliński (Łódź). — Dr. Antoni Czubyński (Ostrowiec Kielecki). — Dr. Jerzy Dobrzycki (Kraków). — Isaj Dratver (Warszawa). — Dr. Leopold Dreher (Kraków). — Hilda Dresen (Tallinn). — Jakób Epsztejn (Lida). — Leonja Frucht - Neumanowa (Sławentyn). — Henryk Gielb (Warszawa). — Olga Goldmanówna (Kraków). — S. Grenkamp (Paris). — M. Jagoda (New York). — Ludmila Jevsejeva (Riĝa). — Stanisław Karolczyk (Warszawa). — † Jan Kaszycki (Kraków). — Ignacy Kegel (Jasło). — Dr. Wanda Koczorowska (Kraków). — Ivan H. Krestanoff (Sofia). — Bronisław

Kuhl (Radom). — Lingva Rondo (Tallinn). — Bernard Long (Londyn). — Minuška Mantel (Lwów). — Jozefo Mátyás (Debrecen). — Emil Mayer (Kraków). — Karol Michałek (Jasło). — Juljusz Mieroszewski (Kraków). — J. Migacz (Nowy Sącz). — Władysław Misiewicz (Radom). — Józef Orzech (Wejherowo). — Prof. Dr. Stanisław Pigoń (Kraków). — Dr. Kazimierz Piotrowski (Kraków). — Antoni Pisarski -- Woydakowski (Warszawa). — Prof. Dr. Józef Reiss (Kraków). — Dr. Wilhelm Róbin (Warszawa). — Henr. Seppik (Tallinn). — Jan van Schoor (Antwerpen). — Prof. Mieczysław Sygnarski (Bydgoszcz). — Marja Szczepańska (Kraków). — Th. Ejvind Tenmasen (Ejsberg). — Irena Traumówna (Tarnów). — Dr. Marjan Tyrowicz (Lwów). — J. Vahtkeel (Tallinn). — Vera Valberg (Upsala). — Halina Weinsteinówna (Warszawa). — Leon Wiener (Warszawa). — Edward Wiesenfeld (Warszawa). — Lidja Zamenhof (Warszawa). — Z. Zawiszanka (Warszawa).

### REPREZENTANTOJ:

Białystok — Esperanta Societo Zamenhofa, Polna 4.  
Katowice — Societo de Esperanto Amikoj, Wawelska 3.

Paryż — S. Grenkamp, 117, Bd. Jourdan  
Warszawa — Halina Weinstein, Leszno 99. m. 5. Konto P. K. O. 27.867.

## ENHAVO DE LA JARKOLEKTO 1935

	Paĝoj		Paĝoj
<b>1. Artikoloj originalaj:</b>		Ivan H. Krestanov -- Pola - bulgara amikeco . . . . .	16
Dr. Wanda Koczorowska — 30 datreveno de l' scienca laborado de la Prezidanto de Pola Respubliko, Prof. Ignacy Mościcki	1	L. Z. — Al mia patrino . . . . .	17
Dr. M. Tyrowicz — La pola gazetaro, ĝia pasinteco kaj la nuna stato	3	Tadeusz Biliński — Kio estas la nuntempa romano? . . . . .	18
M. Szczepańska — Novaj fluoj en edukado de virinoj . . . . .	6	S. Grenkamp — Riproĉetoj kaj kontraŭriproĉo . . . . .	23
Lena — Feliĉan Novan Jaron! . . . . .	8	Dr. L. D. — Kion respondas la recenzinto? . . . . .	24
Jan Kaszycki — La lasta kiso . . . . .	9	O. Bujwid — Leo Belmont . . . . .	27
Henr. Seppik — Novaj perspektivoj	16	E. Wiesenfeld — Leo Belmont . . . . .	28
		Parolado de Dro Adamo Zamenhof	30

	Paĝoj		Paĝoj
Parolado de dr-ino Muszkatblat . . .	30	Dr. A. Czubryński — „Paŝo post paŝo“ aŭ la iluzioj de la E-istoj de pasinta generacio . . . . .	99
Halina Weinstein — Letero al Leo Belmont . . . . .	31	H. Gielb — 30.000 - skolta urbo en arbaroj... . . . . , ,	101
Lec Belmont — Odpowiedź Halinie Weinstein . . . . .	31	J. Orzech — Rimarkigoj de la leganto de P. E. . . . .	103
Halina Weinstein — Respondo al respondo . . . . .	32	Bep Bresler — Letero el Nederlando	104
Leo Belmont — Letero de Leo Belmont, skribita en 1887 jaro al la aŭtoro de Esperanto . . . . .	35	Pri paciga rimedo . . . . .	105
Leo Belmont — Al la Societo „Konkordo“ . . . . .	36	I. Dratwer — Varsovio, Warszawa aŭ Varŝavo? . . . . .	107
Leo Belmont — Blinda poeto - fenomeno (I. I. Kozlov) . . . . .	37	Quo Vadis? . . . . .	108
Dr. A. Czubryński — Propagando dum la kriza periodo . . . . .	43	N. Bertizanka — M/S „Piłsudski“ nova akiro de pola komerca ŝiparo . . . . .	110
Alf. — En unueco nia forto! . . . . .	44	J. Orzech — Ignacy Jan Paderewski	113
J. Orzech — Maurycy Mochnacki . . . . .	45	J. Orzech — Kazimierz Brodziński (1791 — 1835) . . . . .	115
Dr. W. Róbin — Parolado dum la Belmonta vespero . . . . .	45	I. Dratwer — Renkonto! . . . . .	117
Lingva diskuto . . . . .	46	K. Michałek — Magiisto . . . . .	118
M. Mantel — Lwów — semper fidelis	47	J. Epsztejn — Ĉielen kaj surtere... .	120
Ludmila Jevsejeva — Por momento... .	48	J. Orzech — Lingvaj konsideroj . . . . .	121
Leono Vienano — La nigraj flugiloj de la krizo . . . . .	49	Olga Goldmanówna — Impresoj pri ekskurso al insuloj Färöer kaj Islando . . . . .	123
S. Grenkamp — Lastresponde al la recenzinto . . . . .	52	Lola Blankówna — La energia organizo . . . . .	125
J. Orzech — Fryderyk Chopin (1810 — 1849) . . . . .	57	Vera Valberg — Letero al radiopreleganto . . . . .	126
Dr. L. Dreher — Por la Adresaro de Zawada . . . . .	59	Inĝ. M. Chmieliński — Ŝtono sur nia vojo . . . . . ,	129
Bernard Long — Kelkaj malfortajoj de Occidental . . . . .	59	Emil Mayer — Pri laborprogramo . . . . .	130
Leono Vienano — Lingva angulo . . . . .	61	R. Banham — Vojoj al mondlingvo . . . . .	132
Józef Piłsudski (*1867 †1935) . . . . .	71	UDEV-anino — Tiel - aŭ inverse . . . . .	133
H. Gelb — La lasta vojo . . . . .	72	Jan van Schoor — Sunbrilo . . . . .	137
J. Orzech — Pri kaŝuba lando, lingvo kaj verkistoj . . . . .	75	H. Gielb — Poloj en Estonio . . . . .	137
József Máttyás — Voĉoj el alilando post morto de nia Marŝalo . . . . .	76	I. Dratwer — Enue . . . . .	140
Dr. L. Dreher — Lingva esploro 76. 84. 102. 122. 139. 148. . . . .	84	Dr. A. Czubryński — Kurantaj ĉaĝrenoj . . . . .	143
J. Migacz — Esperanto venkos nur per lernejoj! . . . . .	77	R. Banham — La ĝemeloj-revolucioj	145
Th. Ejvind Tenmásen — Stranga rakonto . . . . .	79	Jan van Schoor — Kial mi re kisu vin? . . . . . ,	147
Inĝ. M. Chmieliński — Iom pri novaj eblecoj de E-propagando en Eŭropo . . . . .	81	M. Mantel — Signalas! Atentu! Gatsatoko. . . . . ,	151
Dr. A. Czubryński — La esperantismo el la vidpunkto de ne-esperantista publiko . . . . .	82	<b>2. Tradukoj:</b>	
H. Gielb — Kie pasigi la someran libertempon? . . . . .	86	— El infanaj jaroj de Marŝalo Piłsudski (tr. Prof. Sygnarski) . . . . .	2
I. Dratwer — La vivo komenciĝos morgaŭ... . . . .	90	Marja Konopnicka — La fato de Staŝ (tr. Józef Bociek) . . . . .	8
H. Gielb — Kolegio de internaciaj prelegoj akademiaj en Gdynia	91	Jan Lemański — Najbaroj (tr. Baroko)	8
Sinceraj konfesoj de l' redaktanto	92	— Parolado de Leo Belmont (tr. Halina Weinstein) . . . . .	32
H. Gielb — La batalo kontraŭ krimo	96	Leo Belmont — Mia portreto (tr. Edward Wiesenfeld) . . . . .	36
Prof. Dr. O. Bujwid — Migranta Kongreso de 35 popoloj . . . . .	97	Leo Belmont — Sur la margeno (tr. St. Karolczyk) . . . . .	37
		Puszkin — Mickiewicz (tr. Leo Belmont) . . . . .	40
		Puszkin A. S. — Soneto pri sono (tr. Leo Belmont) . . . . .	51



	Paĝoj
T. J. Wójcicki — La migranto (tr. Wł. Misiewicz)	60
Mickiewicz — Vidaĵo de montoj el Stepoj Kozlovaj (tr. Leo Belmont)	62
I. Nikitin — Nesto de hirundo (tr. Hilda Dresen)	65
Leo Belmont — Maja fabelo (tr. Halina Weinstein)	77
Wincenty Pol — La kanto pri mialando (tr. Józef Orzech)	88
J. Mieroszewski — La elektra liriko (tr. la aŭtoro)	89
Erni Hür — Ne kreskas la spirit' rapide (tr. Hilda Dresen)	91
Juljusz Słowacki — Interparolo kun piramidoj (tr. Leo Belmont)	107
Henryk Sienkiewicz — Fiereco (tr. I. Kegel)	119
Albrecht Rodenbach — La kanteto de l' pafilo (tr. Jan van Schoor)	137
Stanisław Przybyszewski — El „Chopin kaj la nacio“ (tr. Bogdan M.)	146
<b>3. Bibliografio:</b> 12. 21. 78. 95. 112. 135. 150.	
<b>4. Esperantista kroniko kaj movado:</b> 11. 19. 20. 25. 26. 40. 53. 68. 79. 94. 109. 141. 151.	
<b>5. Kongresoj, kunvenoj ktp.:</b> 42. 47. 51. 65. 73. 128. 145.	

	Paĝoj
<b>6 Radio:</b> 14. 15. 26. 50. 70. 142. 152.	
<b>7. Redakciaj kaj Administraciaj sciigoj, Alvokoj, Nekrologoj ktp.:</b> 6. 14. 39. 48. 50. 56. 64. 106. 123. 127. 140. 142. 148. 152.	
<b>8. Konstantaj rubrikoj:</b>	
Distrajtoj: 10. 25. 96.	
Novaĵoj el Esperantujo: 19. 55. 67. 93. 110.	
Teatro kaj filmo: 10. 65.	
Skolta angulo: 40. 55. 70. 80. 87. 117. 139.	
<b>Aldonoj:</b> Prof. Dr. Kazimierz Ajdukiewicz — Pola filozofia penso en lasta jarcentkvarono (Nr. 2).	
Dr. Kazimierz Piotrowski — La pola aviado (Nr. 2 kaj 4).	
Prof. Dr. Stanisław Pigoń — Ĉerko kaj lulilo de Pollando en „Sinjoro Tadeo“ (Nr. 5).	
Z. Zawiszanka — Pri Marŝalo Józef Piłsudski (Nr. 6).	
Prof. Dr. Odo Bujwid — Rememoroj pri la unua Pola Marŝalo Józef Piłsudski (Nr. 6).	
Prof. Dr. Józef Reiss — Mazurkoj de Chopin (Nr. 6).	
Dr. Jerzy Dobrzycki — Wawel — Pola Panteono (Nr. 11).	
Dr. Marjan Tyrowicz — Pollando kaj poloj en pasinteco kaj hodiaŭ (Nr. 12).	

faris migradon el ĉirkaŭaĵoj apud la rivero Odro al tiuj apud Bug. Tiu detalo, ilustranta la matematikan situon en Eŭropo estus eble sen speciala signifo, se ne tio, ke obstinaj bataloj estis kondukataj ĝuste pri tiu landpeco, kiu de jarcentoj prezentis la plej favoran koncerne la akvo- kaj landvojojn mallarĝigon de la kontinento inter la Balta maro kaj la Suedo-Karpata montaro. Al du malfermitaj pordegoj okcidente: al la pordego lusica (lużycka, germ. — Lausitz) kaj moravia, respondas ĉi tie en oriento du egale gravaj pordegoj: smoleńska, kaj nigromara, tra kiuj la penetrantaj fluoj facile povis atingi la vastan malaltajon de grandaj valoj en meza Polujo. Multe pli malfacile venkebla por la mezepoka homo montrigis la norda barajo en formo de netraireblaj arbaregoj, marĉaĵoj kaj lagoj, apartigantaj Pollandon de la balta Pomeranio.

La suda barajo en formo de la karpata arko ludis en krepuska mezepoko de Polujo la saman rolon, kiel hodiaŭ. Kreante principe klaran nacian limon, ĝi estas samtempe dank' al multaj trairejoj la zono de oportunaj vojoj de sudo norden kaj kontraŭe. Tial kune kun la moravia pordego ĝi ludis escepte agrablan rolon en historia disvolvo de Polujo. Venis tra tie jam en la antaŭhistoria epoko - kupro, bronzo kaj fero, kies uzado donis nomon al la antaŭhistoriaj epokoj, tra tie iris poste la intersanĝado de l' balta sukceso je etruskaj kaj italaj laboraĵoj, tra tie penetris la lumo de l' Krista kredo, kaj en sekvintaj jarcentoj eksvarmis tiuj irejoj pro tre vigla trafiko ne nur komerca kaj koloniiga, sed ankaŭ pro kultura. Senditoj kaj legatoj papaj, grandaj artistoj kaj scienculoj, polaj nobelaro kaj junularo, celantaj la famajn universitatojn italaĵn, homplenigis tiujn vojojn ek de matenkrepuskoj de humanismo ĝis la XVII jarcento.

La norda barajo for de la Balta maro ne baldaŭ falis. Antaŭ ol la polaj hakilo kaj sabro signis al Polujo larĝan trairejon por daŭra regado super la maro, sidlokiĝis tie la alveninto dangeŝta kaj avida, la markgrafoj brandenburgaj, kaj poste la krucordenoj. Do la plej potenca balta ŝtato, kiu estis kaj estas ĝis hodiaŭ Pollando — ek de tagiĝo de sia ŝtata ekzistado estis forŝovita for de la maro. Tamen ĝian signifon

## ESTU PRETA!

Sekretariejo de Skolta Esperantista Ligo (Pollanda Distrikto), Kraków, Lelewela 9. m. 2. — sciigas ĉiujn geskoltojn, scipovantajn Esperanton, ke ili aliĝu tuj, senhezite, al la supre citata adreso por pligrandigi vicojn de la S. E. L.-anoj. Ĉiu skolto-esperantisto rajtas porti sur maniko, ĉemizinsignon — kvinpintan verdan stelon — insignon de Esperantistoj por montri konon de helpa internacia lingvo.

### Grava peto.

Skolto estas fraĵo al ĉiu alia skolto! Memoru do, ke via devo estas sukcesigi Esperanton inter la tutmonda skolto!

### „Kantas la hungara skolto“

La Esperanto-Studrondo de la Hungara Skolta Asocio eldonis kantlibreton de skoltaj kantoj en Esperanto. La prezo nur 1 resp. kup. Meĉdu ĉe: Hungara Esp. Skolta Rondo, V, Nagy Sándor — utca 6.

## Al la esperantistoj-verkantoj

Preparante eldonon de libro-almanako pri ĉiuj esperantistoj — ĵurnalistoj, verkistoj kaj poetoj, kaj ĉiuj verkantaj espe-

rantlingve, aŭ nacilingve, sed sciantaj esperanton — mi petis pri alsendo de bezona tiucele materialo (vidu la antaŭan n-ro de Pola Esperantisto). La rezultoj de la komuniko estis brilaj, oni alsendis al mi multan materialon, sed bedaŭrinde, ne ĉiuj konsideris mian peton. Oni ekzemple sendis al mi grupan foton, anstataŭ persona pri la koncerna persono, la biografioj estas multfoje nelegeblaj, aliaj eĉ sendis min al la Esperanta Enciklopedio aŭ al aliaj fontoj, kie mi trovu la koncernan foton kaj biografion. Unu esperantisto sendis min eĉ al iu antaŭmilita gazeto por tie preni lian foton kaj biografion... tre bone, ke tiu s-ro ekstere (la foto) ne ŝanĝiĝis, sed mi pensas, ke dum tiu longa periodo li eble ion plian verkis kaj publikigis.

Tio ne nur malhelpas mian laboron, sed eĉ faras ĝin neebla.

Refoje mi petas konsideri mian unuan komunikon kaj sendi materialon tute konforme al ĝi.

**Antoni Pisarski-Woydakowski,**  
Redaktoro

de Pola Agentejo Telegrafa —  
Warszawa PAT.

La materialon mi petas sendi je adreso:  
Antoni Pisarski-Woydakowski, Warszawa,  
strato Złota 35/38, Pollando.

por la ŝtata organismo bone taksis la penso de polaj reĝoj, komercante de Mieszko la I. kaj Boleslavo la Brava ĝis Waŝoj kaj la aneksita teritorio almenaŭ parte estis forprenata al la invadintoj. La venkoj de Boleslavo la Kurbaŝa, kiuj portis al Pomeranio ne nur la polan regadon, sed ankaŭ la Kristan instruon, perdita de postaj Piastoj, en periodo de dividigo de Polujo je provincoj, estis reakirita per la politiko de Jagelidoj, precipe tiu de Vladislavo Jagielto kaj de Kazimiro Jagelido. La stato de posedo, fiksisita per sekularizo de Prusujo en tempoj de Sigismundo la Maljuna subigis al grandaj ŝanceliĝoj en tempoj de elektataj reĝoj, por fine ekhalti ĉe iu ŝtato teritoria, kiu tradaŭros verdire ĝis la dispartigoj, sed ĝi estos ĉiam pli forte minacata de plikreskanta potenco de ŝtatoj, interesitaj pri posedo de l' suda parto de la Balta maro.

Dum tiuj teritoriaj ŝanceliĝadoj kaj ĉiam moviĝantaj limoj de ĉiuj flankoj, krom de l' sudo, formiĝadis la naturo kaj animo de polo. Ĝi formiĝadis ne nur sub influo de profunde en psikon slavan kaj polan enkreskintaj ecoj, sed sub forta agado de senpera kunvivado kun fremdaj naciaj elementoj, kaj tamen tre proksimaj: rutena, litova, prusa kaj eĉ germana, kaj tiujn ĉi elementojn kunfandadis je unu organismo la politika ideo, la ideo de potenco, pli forta ol la individuaj interesoj de naciaj faktoroj.

Eĉ dum la matenkrepusko de la pola ŝtato, en la dua duono de la deka jarcento, antaŭ ol la popolo apud Odro kaj Vistulo eniris en la familion de kristanaj nacioj, ni vidas sur la pola tero la nacion, restantan psike en periodo de slava unueco, do en epoko antaŭhistoria. Ĝistunde paca kaj agrikulturista vivmaniero kaj la demokratia egaleco same en terposedado kiel en sociaj rilatoj, krom la kulto por familipatriarkoj — karakterizis tiel profunde la polajn gentojn, ke ili kreis nenian popolan epopeon, prikantantan la farojn de bravaj batalantoj aŭ de estroj de gentoj.

Sed dum longaj vintraj vesperoj, dum helaj someraj noktoj, ĉe laboro de ŝpinantinoj aŭ dum edziĝaj festoj kaj familiaj aŭ religiaj solenaĵoj aŭdiĝadis kantoj kaj rakontoj, transirantaj de generaci' al generacio pri beleco de l' naturo, pri

sistante ĉefe el fremda elemento, disvolvas propran, apartan kulturon.

Grandaj mensaj kaj artistaj fluoj de Eŭropo: humanismo kaj renesanco, baroko kaj rokoko per larĝa enfluejo venadis Polujon kaj multe disvastigadis. Tamen ilia efikado ne plugiĝis la polan psikon ĝisfunde kaj daŭre, kiel tio estis en socioj okcidentaj. Nur la plusaj valoroj penetris la naturon de poloj porĉiame, kvankam la stilo de artitekturo aŭ aliaj fakoj ŝajnis tie kaj ie funde ŝanĝi la fizionomion de urboj kaj nobelaj rezidejoj. Decas ĉi tie ripeti laŭ Aleksander Brückner, eminenta konanto de pola kulturo: „La nacio restis slava, kun ĉiuj ecoj de l' raso, plusaj kaj minusaj, kun fizika kaj mersa vigelecoj, malhipokriteco kaj sincereco, kun manko de obstino kaj antaŭvidemo; en plej bonaj siaj reprezentantoj ĝi impo- nis per takto, profunda konsidero, manko de iu ajn fanatismo, religia aŭ racia, per profundo de justecseno, per mal- ŝato al eksteraj rimarkiloj kaj ĉiu vanteco“.

Kaj tamen post lastaj rapsodoj de heroeco apud Ĉo- cim kaj Vieno venis la spirita kaduko, ekestis surdeco kaj krepusko de malprogreso kaj stagno. Jen malĝoja historio de l' dua duono de XVII jarcento kaj de unua de XVIII. La granda reviviĝo mensa kaj morala mallonge antaŭ la falo de l' ŝtato kronita per eterne memorinda Maja Konstitucio tro- vas veran kontinuon en la XIX jarcento.

Jen la disvolva vojo, kiun trakuris dum jarcentoj la po- la psiko, por veni al la hodiaŭa vizaĝo. Enestas en ĝi bo- naj kaj misaj ecoj de praavoj kaj patroj, baraktas en ĝi tra- dicio kaj alligiteco al la pasinteco kontraŭ ĉiam pli trudemaj postuloj de moderna psikologio. Jen la batalo longa kaj la- peno grandega. Al grandaj spiritoj kaj mensoj de la nacio a- partenas la direktado de tiu kolektiva evoluo nacia en e- stontecon, kiun el krepuskaj mallumoj de pasinteco la hi- storio eligas suprajn.



DR. MARJAN TYROWICZ (LWÓW).

## POLLANDO KAJ POLOJ EN PASINTECO KAJ HODIAŬ.

Jarmilon de historio kaj disvolvo de kulturo fermas en si la pasinteco de Polujo. Milon da jaroj — ek de unuaj ko- mencoj de politika kaj historia ekzistadoj — tra escepte tem- pestaj vojoj de granda civiliza misio, tra helaj lumoj de milita ĝloro kaj pace ekonomia ekspansio kaj tra malserenaj om- broj de malvenkoj, kadukeco kaj fine tra cent-kvindekjara mallibereco — iris la pola nacio al sia venonteco. Jen ni estas ĉe ĝia sojlo, ĉar la iro ankoraŭ ne finiĝis. La granda nacio, potenca per sia interna vivo — ne rajtas fari la finon de sia civiliza migrado. Tro mallongaj por ĝi estas la jarcentoj, ĝi trapasas eĉ jarmilojn.

La nuntempa pola ŝtato, donanta la politike enkorpi- gitan esprimon al sopiroj de l' pola nacio en la tagoj de l' ma- llibero, sigrifas sur karto de l' hodiaŭa Eŭropo la ĉefan ligi- lon de l' paco kaj sekureco, sub kies flugiloj povas disvolviĝi la progreso de l' spirita kaj materia kulturoj dum longaj jaroj. La skuo aŭ malfortigo de tiu ligilo kapablas sammomente trastreki la pacon kaj ordon de l' tuta kontinento, kies po- loj post terura kataklismo de l' granda milito — ne en io alia, ol en konkorda kaj humana kultura kaj ekonomia kun- laboroj devas vidi sian plej ĝustan taskon.

La historio de unu jarmilo sur polaj teroj donas gran- diozan bildon de nacia evoluo, en kiu la kapablo por akcepta- do de nobligaj fremdaj influoj batalis pri supereco kontraŭ la profunde deraskaj instinktoj kaj nacia psiko. Treege mal- facila geografia situo, multe pli favora en antaŭhistoria erao ol en historia — antaŭsignis al Polujo kaj ĝiaj loĝantoj la vojon de historia marŝo, dum kiu la puŝado de l' germana elemento el okcidento turnis okulojn de Polujo orienten, en

tiu direkto signante al ĝi ĝian historian mision. Kaj jen perforte kaj per arma invado puŝataj for de la rivero Elbo — iris poloj oriente, sed ne sabro kaj brulŝtupo signis etapojn de tiu marŝo — signis ilin la pola plugilo kaj la Krista kruco; anstataŭ la serkompromisa anekso — la paca kuniĝo de regnaj familioj de princoj polaj, rutenaj kaj litovaj, fine la granda verk. de politikaj unuigoj kun hungaroj, prusoj, litovoj kaj rutenoj, Polujo, forŝovata for de l' okcidento de Eŭropo, farigadis samtempe ĝia heroa defendanto kontraŭ la minacaj amasoj trenmarŝantaj el oriento, — tiuj de tataroj kaj turkoj ĝis la komunisma ondo, estanta nuntempe la timigilo de l' okcidenteŭropa socia ordo.

Ne nur en la politika rolo, sed ankaŭ en la politika vizaĝo sur spaco de tiu jarmilo okazis profundaj ŝanĝoj. En ligo kun formigado de politikaj rilatoj la socia evoluo faris grandan vojon ek de kampuloj, enamigintaj en siaj kampoj kaj ĉasejoj, malemaj al milito kaj sociaj diferencoj, rezultantaj el materia supereco de unuj kontraŭ aliaj, ĝis militista kasto, elkreskinta sur militaj meritoj kaj nobelaro, kiu ĉiam pli dekutimigadis de la tenaĉara vivo pli ŝatante la trankvilan vivmanieron de biemposelarto.

Krom la efikado de Polujo je oriento signiĝis en historio de tiu lando ankaŭ la kontraŭa direkto. Dum longedaŭraj baraktadoj kontraŭ Moskvo, tataroj, turkoj, kozakoj kaj moderna rusa imperio, aliflanke de la Balta maro kontraŭ idolaraj prusoj, poste krucordeno, Brandenburgo kaj Svedujo la teritorio de Polujo aperis tuteplene kiel multjarcente tempesta kruciĝejo de militaj vojoj, sur kiu nur nacio kompakta, forta laŭnombre kaj nur al ŝtata ideo subigita, povas persisti. Kaj tiu historia vero ankaŭ hodiaŭ neniom perdis de sia aktualeco.

Sufiĉas rigardi la karion de Eŭropo. La hodiaŭa pola ŝtato, estanta duono apenaŭ da pola respubliko en momento de l' urnua dispartigo, kuŝas preskaŭ en idee matematika mezo de Eŭropo, kio signifas, ke la meza meridiano kaj paralelcirklo de l' kontinento tratanĉas sin en centro de la pola ŝtato, oriente de Varŝavo. Tiu centro en kuro de jarcentoj

l' printempo kaj amo. Oni ne prikantis militon aŭ riĉaĵon devenantajn el diferencoj de posedo. La kulturo vere popola kaj vilaga, ĉar kasteloj defendaj nur tre malofte ekzistis en la lando, elkreskis sur teritorio de vastaj kaj obtuzaj arbarejoj, misteraj kaj abismaj marĉoj, inter ne tre largaj herbejoj kaj kampoj, kiujn oni devis forŝiri de la arbaroj. La religiaj kredoj je materialisma fundamento, kutimaro, esprimarta sin en absoluta alligiteco al la libero kaj al nerenkontata aliloke ĝastamo, kuniĝadis kun impulsigema temperamento, sed ema al konkordigo.

Sub influo de la germana puŝado, kaj poste de la kristana kulturo tiu psiko subigas al tre gravaj ŝanĝoj. Eliĝas subpren folkloro kaj kelkaj artismaj preferoj, kiuj ĝis nun restadis kaŝite. Favoris ilin rek la severa klimato nek sufiĉe monotona pejzaĝo, en kiu mankis la vidaĵo de maro kaj de altaj montoj. Monotona susurado de pratempa arbarego reellulis muzikon, kaj la plastikan sentemon vekis nek vastaj neĝsurŝutaĵoj nek la longaj vintraj noktoj.

La kulturo de monaĥejoj kaj de Piast'a kortego, ĉirkaŭata de ĉiam pli grandioza militista sekvantaro, enkondukas kelkan diferencigon en la kamparanan amason ĝis nun idolaran. Krom la spirita diferencigado komencas aperi ankaŭ la kastaj diferencoj. La lokon de ĝis nun ĝenerala tipo de kampulo-agrikulturisto komencas suriri kavaliro-militisto kaj nobelo-magnato. Kraskas ĉiam pli urboj kaj kasteloj, monaĥejoj kaj vilaĝoj de fremdaj koloniuloj. En urboj formiĝas tipo de l' urbano, metisto kaj komercisto.

Krom la ĝvida situo de l' pastraro, kiu por la kulturo de Piasta kaj Jagelida Polujo kontribuis vere netakseblajn meritojn, elkarasante en latina atmosfero de pensoj kaj poezio — kvazaŭ grandvaloran juvelon — la krakovan Alma Mater (universitaton), sur frunton de politika vivo elŝoviĝas la nobelaro. La mezepoka kavaliro ŝanĝiĝas dum kuro de jarcento je daŭre loganta nobelo, kuniganta la militan metion kun la profesio de agrikulturisto. La pola kulturo farigas, ĝisfunde nobela, kaj la pola plebo tute malaperas el areno de l' publika vivo. Ankaŭ la urbanaro en tiu vivo ne partoprenas, kiu, kon-

koletoj, kiu estas nederlandano, ne povis scii tion, sed mi miras, kial la redakcio ne mem ŝanĝis la tekston. Por nia nederlandano s-ano la vorto estas nure ia fremda geografia popolnomo, kion oni vidas el la esprimo de la aŭtorino: Huculipopolo.

La sama aŭtorino erare uzis: ni perdis la fidon en la kuraĝaj, fidelaj ĉevaloj, anst. je.

Fine, la sama uzis: tio ne estis sonĝo, sed bela, efektiva realeco, anst.: realaĵo.

\*

Refoje mi trovis la kondamnindan: nek, anst. eĉ ne, ne eĉ. Temas pri la artikolo „Pri paciga rimedo“: „respondante nek foje la ricevaĵojn.

Anst. „oni rezignu el“ d. e. pri aŭ je.

Ankoraŭ kaj ankoraŭ „nek“ anst. eĉ ne en „Similan triumfon sukcesis nek unu alia libro. La frazo, cetere, povas teksti: neniu alia libro.

Mi ne ŝatas „unu“ anst. „iu“: „La ĉarmo de la libro estas tia, ke unu angliano post la traŭgo de Quo vadis, diris“.

Anst. „La kamparanoj ne aljungiĝis ankoraŭ videble siajn veturilojn“ (citaĵo el

Quo vadis, trad. de Lidja Zamenhof) mi prefere skribus: la kamparanoj evidente ne aljungiĝis ankoraŭ siajn veturilojn. Aŭ, almenaŭ, mi uzus komojn, por doni al la skriba vorto ĝian ĝustan signifon: la kamparanoj ne aljungiĝis ankoraŭ, videble, siajn veturilojn.

Anst. „nova akiro de Pola komerca ŝiparo“ mi preferas: akiraĵo.

Anst. la ŝippersonaro kalkulas ĉ. 250 personojn, mi preferas: nombros. Kalkuli estas cerba laboro, kiun ĉi kaze ni ne atribuas al la ŝippersonaro.

Anst. „departamento“ ŝajne pli uziĝas „departemento“ elfranca.

La nova radiko „strebi“ preserare aperis kiel strebi (paĝo 111 malsupre dekstre). Multaj verŝajne ne scias ankoraŭ, ke „strebi“ estas depost ĉi tiu jaro oficiala, plenrajta civitano en nia lingva reĝno. Ĝia signifo estas: dążyć do czegoś. Ĝis nun oni uzis: celi, aspiři, kłópać k. s. Mi, persone, ne estas tre entuziasma pro tio, ke estas oficialigitaj lastjare tiom multaj novaj radikoj. Sed pri tio — alio kaze.

Dr. Leopold Dreher.

## SIGNALAS! ATENTU! GASATAKO!

Nia Lvova „Goniec Wieczorny“ gazetraportas pri la fama angla ĥemiisto, laŭreato de Nobel, Profesoro Goddy.

La fama scienculo konstatas, ke la rimedoj, proponitaj de la angla registaro en la milito per venenaj, kaŭterizaj gasoj, ne metas barojn al la seninterrompa plivastiĝo kaj pliampleksiĝo de aera ŝiparo en ĉiuj ŝtatoj kaj konstanta evoluo de ĥemiaj inventoj.

Scienculo Goddy alvokas la tutmondajn ĥemiistojn, per unuecaj fortoj malebligi la estontan gasmiliton.

Nur la unuigo de ĉiuj ĥemiistoj-inventistoj savos nin de la detrua aerofantomo, ŝvebanta super niaj kapoj, la morto per venenaj gasoj: la estonta pereigilo de la tuta homaro.

Kie magazenoj tentalogis per silkvestaĵoj, parfumoj kaj apetitigaj frandaĵoj, malice nun mienas monstraj gasmaskoj, flavkapaj, rostrobuŝaj. Gumaj vestaĵoj postulas surkorpigon.

Kie bonodoraj floroj balanciĝis sur siaj trunketoj, embuskas nun dikventraj bareloj, entenantaj klorkalkon, sablon kaj kestojn, plenajn de kuracistaj saviloj. Kie helaj okuloj, la fenestroj alridetis, krucmetitajn paperbandojn defende

fiksis nervaj fingroj, dikaj tukoj kaŝas la fendojn de la pordoj.

Grizan nubokovrilon dissternas sur ĉielon S-ta Petro, larmojn verŝas la flugilhavaj infanoj, anĝeletoj.

Okulo gape fiksiĝas al la ŝtonaj kolosoj de la urbo, kiujn ornamas avertoj:

**„Atentu! Gasatako!“**

Timpano obtuze ekĝemas. Saksofono ekmuĝas plendeme, gamon singulte ektrilas fluto, en la amuzejo.

Paraliziĝas vivoĝojo. Estingiĝas la suno.

Ombrosimile glitas policanoj tra la griza vespero. Elektre lumigitaj ruĝaj krucoj flame montras la sav-vojon al la rifuĝejo.

La stratoj senhomiĝas. La pavimo ekbriletas en glitiga humideco.

En iu flankstrato staras ŝarĝveturilo, la kvarpiedulon kovras „porkbuŝa“, vitrookula, flavverda gumaĵo.

Gardanto pri bonordo tenas la bridojn, ankaŭ lian kapon kovras „masko kontraŭ la morto“.

La urbo emanis nervemon. La fenestroj dormas, la flamaj okuloj de la lanternoj pigmeiĝas, time ekflagras... fine laŭvice estingiĝas, kiel kondamnitaj animoj.

Angoro rampas mielpiede, akraunge tra la morna malheleco. La tero soifas la odoron de l' iperito, pulmojn kaŭterizanta, putriĝon kaŭzanta veneno.

La aeron fendas sono, korpaspzmiga. **Signalas! Atentu! Gasatako!**

Inter ia kvar muroj de la ŝtonaj rifuĝejoj peze spiras la buŝoj, malantaŭ la gasmaskoj. Sablo, klorkalko, kuracista savmaterialo haladzas strangan parfumon. La gorgo de l' Universo eligas velaŭton, anoncas hurlante dum kvin... dek... minutoj... „Savu vin! Atentu! Gasatako!

Ŝtalaj birdoj tranĉe krczas tra la nubokovrilo. La helicoj kantas malican melodion de l' morto. Lumĵetiloj elkraĉas laktece blankan faskon, kiu suĉe fiksiĝas sur la tegmento de l' ĉefstacidomo.

Gantumita mano ektuŝas levilon, tuba faringo elvomas petardon, kiu akraŝone malsupren siblas. La viktimo, ĉefstacidomo vundita, ekblekas, vitron, lignon avide lektuŝas fajrokolono.

Ujoj, plenaj de mortiga enhavo, krake eksplodas sur la korpo de la Tero. La skeleta viro erpe travagas la Universon, abunde rikoltante.

La teron perforte subprenis la osteca monstro. Inter fajro, krakoj ili festas sian edziĝnokton. Edziĝkanton bruas la aeraj

maŝinoj, sangofloroj ornamas la palan frunton de la Fianĉino Tero. Dancas la mondo en freneza kirlo, siajn ostojn klake tuŝas la senokula, senkarna „Fianĉo“, avida je viktimoj.

Petardojn semas, dum kroza flugo, aviadisto ŝtalnerva.

Mil stertoroj fraptuŝas la ŝtalajn korpojn, kiuj balanciĝas en la venena sfero.

Kie magazenoj allogis per okulplezuroj... oscedas kavoj, entenantaj bruligitajn karnopecojn. Iperitparfumo embuskas en la teraj sulkoj.

Ŝtona ventro de l' domo, plende montras siajn „intestojn“... iamajn loĝejojn... florpoto brue klakas sur pavimon, displitante.

La vento susure movigas la avertilojn, glufiksitajn al la muroj de la iama domo...

Atentu! Gasatako! At....

Mi fermas la feran rulkurtenon, antaŭ la kruela spektaklo.

Antaŭ mia fenestro, movas siajn kapetojn belegaj floroj. Blankfela kato murmure karestuŝas per velura piedo mian vizaĝon.

Hirundo etendas siajn flugilojn, eksvingiĝas en la bluan forecon...

M. Mantel.



## RECENZOJ.



**Rolf Nordenstreng: LA HOMAJ RASOJ DE LA MONDO.** 212 paĝ. 140 bildoj. Eld. Soc. Esperanto, Stokholm. Prezo sved. kr. 3,25 broŝ., 4.75 bind.

Dum la Stokholma kongreso 1934 prelegis en la Somera Universitato Dro Rolf Nordenstreng, sveda sciencisto, pri la raso de la sveda popolo. Dro Nordenstreng jam en la 1890-aj jaroj okupis sin pri Esperanto, sed pro siaj sciencaj studoj kaj laboroj li ne trovis tempon por Esperanto. Nun li denove komencis uzi Esperanton buŝe kaj skribe kaj post la Stokholma kongreso li verkis libron pri la temo „La homaj raso de la mondo“, temo, kiun li tre multe studis kaj kiun li pritraktis en kelkaj libroj svedlingvaj pli frue verkitaj.

La verkinto ĝisfunde studis la problemojn, kiujn li pritraktas, kaj li sin apogas sur la lastaj rezultoj de la scienco tutmonda. Liaj vastaj konoj lingvaj multe helpas al li, precipe kiam li verkas en Esperanto pri temo preskaŭ tute nova en

tiu lingvo. Estante sendependa sciencisto, li havas proprajn opiniojn, kiujn li brave defendas.

Esperantistoj, kompreneble, devas interesiĝi pri fremdaj homoj, popoloj kaj rasoj. Sed kiom ni scias pri la homaj rasoj? Ne multon. Ni false kredas, ke la loĝantaro de lando apartenas al nur unu raso, sed rase puraj popoloj ne ekzistas. Ankaŭ ne ekzistas, laŭ Dro Nordenstreng, superaj kaj malsuperaj raso — la eksteraj karakteroj ne donas al iu aŭ iuj rasoj ian pli altan lokon. La aŭtoro pritraktas la rasan demandon justece, li ne rigardas la homajn rasojn el la vidpunkto de blankulo sed de tutmondulo. La superstiĉon tro oftan en rasaj problemoj li akre atakas, celante la purigon de la rasa scienco por el ĝi fari noblan helpilon al politiko tutmonda.

Kio estas rasa biologio? La aŭtoro respondas: Rasa biologio estas la scienco pri la diversaj specialaj tipoj heredaj de

unu sama speco besta aŭ planla. Ordinare oni tamen uzas la vorton rasbiologio pri la homo kaj ĝiaj rasoj.

La libro estas varma pledo por amikeco inter la rasoj malsamaj — celo, kiun

devas plene subteni ĉiu esperantisto. Tial la esperantistoj ankaŭ legos kun intereso la libron, kiu estas bonvena pliriĉigo de nia tro malriĉa popularscienca literaturo.

## POLLANDA KRONIKO

**CHORZÓW.** Rondo Esperantista — Chorzów (Królewska Huta) aranĝos „Solenan Zamenhofvesperon“ la 15, 12, je la 15—18 horo en Dom Polski, ul. Wolności 64, al kiu ĉiuj geesperantistoj de Silezio kaj najbaraj regionoj estas kore invitataj.

**KRAKÓW.** La 19 de novembro k. j. okazis la Ĝenerala Kunveno de „Societo Esperanto“. La Estraron eniris kiel: prezid. — Prof. Dr. O. Bujwid, vicprezid. — Dr. Rosenstock, sekr. — Zajączkowski, v-sekr. — Weinsberżanka, kasist. — Kutschner, v-kas. — Srebrna, bibliot. — Rosenblattowa, mastrumantino — Neuberżowa, aranĝoj — Bertizanka. Rev. Kom.: Marja Szczepańska, Prof. Kowalski, Wiesenberger; anstataŭantoj: Presser, Bromek.

**LUBLIN.** Post somera ripozado komenciĝis en sino de P.E.A. grupo Lublin vigla propagandlaboro: multaj mencioj en lokaj ĵurnaloj, grandmezuraj afiŝoj, flugfolioj kaj fine 2-monata kurso de Esperanto, kies solena malfermo okazis la 14. XI. k. j. en belaejo de Ŝtata Vira Seminaro Instruista ĉe str. Narutowicza. Kiel lernolibro estas elektita II-a eldono de „Lekcje języka światowego Esperanto“ de prof. M. Sygnarski el Bydgoszcz. Kursgvidanto estas Del. de UEA s-ro Mgr. Cz. Pruski. — Dum oktobro k. j. vizitis nian S-eton samideanoj: s-ro J. Dębski el Swidnik, s-ro T. Pleskaczyński el Garwolin kaj s-ro F. Kotliński el Piaski. — Pri la preparlaboroj por akcepto de hungara foro el Debrecen printempe en 1936 ekinteresiĝis Urbeŝtraro, kiu jam delegis en la Prepar-Komitaton sian reprezentanton, s-ron Petruczynik, Ĉefon de Kulturkleriga Fakto. — Vitrino ĉe la ĉefstrato Krak. Przedmieście sukcese plenumas sian rolon kiel konstanta ligilo inter P.E.A. kaj vasta publiko. Diversenhavaj afiŝoj estas ŝanĝataj preskaŭ ĉiusemajne. Alurbaj kaj eksterlandaj gesamideanoj estas petataj sendi konforman materialon laŭ adreso: Pola Esperanto-Asocio, F. lio en Lublin, str. Królewska Nr. 6.

**NOWY SĄCZ.** En eldonata ĉi tie semajna gazeto „Głos Podhala“ aperis en

n-roj 13, 16, 19, 24, 26 lerte redaktitaj de s-ro J. Migacz propagandaj artikoloj pri Esperanto. Koran gratulon!

**WARSZAWA.** Merkrede, 20. XI. 35, okazis en laejo de „Konkordo“ prelego de s-ro E. Wiesenfeld sub titolo: „La plej nova scienca verko de la Prezidanto de Pola Respubliko, Prof. Dr. Ignacy Mościcki en lingvo Esperanto“.

Post la enkonduka parolado, en kiu la preleganto disvolvis bezonon de scienca literaturo en Esperanto kaj speciale la prilaboron de l' esp. nomenklatur, s-ro Wiesenfeld tralegis fragmenton de la kun permeso de l' aŭtoro tradukita verko de Prof. Dr. Mościcki.

Post la prelego la aŭskultantaro provis sian interesigon per diversflankaj demandoj, kiujn la preleganto penis laŭeble respondi.

Entute la instalaĵo inventita de nia Prezidanto prezentiĝas impona eltrovaĵo, plifaciliganta laborkondiĉojn same spiritalajn kiel fizikajn en grandurbaj laborejoj, precipe kie ĉeestas samtempe multe da homoj. Ni esperu, ke la praktikaj rezultoj de tiu eltrovaĵo estos granda faktoro por pligrandigi la laborkapablon.

— La traduko estas farita speciale zorgeme en interkompreno kun la Internacia Teknika Komisiono.

Varsovia Esperantista Societo (Leszno 56/9, tel. 1206-85, h. 20—22, prezidanto Isaj Dratwer, sekretario Janusz Markowski) estas sola societo en la urbo, kiu funkcias regule ekde du jaroj ĉiuvespere. Ĉiumarde okazadas klubaj vesperoj kun referaĵoj, diskutadoj k. s. Lasttempe i. a. okazis referaĵo pri „Abisenio“ kun 60 lumbildoj. Meza partopreno 30 — 50 pers. Ĉe la Societo ekzistas biblioteko kaj legejo de esperantaj kaj polaj gazetoj. Antaŭ kelkaj tagoj komenciĝis propaganda kurso kun ĉ. 50 pers.; gvidas f-ino mag. Szyn delman. Pluaj kursoj en preparo. — Varsoviaj gesamideanoj estas petataj aliĝi al la Societo kaj partopreni en ĝiaj aranĝoj.

Mortis **Charles Richet** unu el plej grandaj geniuloj, en la aĝo de 84 jaroj. Liaj sciencaj laboroj en diversaj fakoj estas fame konataj. En estonta numero ni priskribos kelkajn liajn malkovrojn.

Vera amiko de esperanto, kiu propagandis en sia patrolando valoron de nia lingvo.

## RADIO.

La 27. XII. la stacioj en Kraków kaj Warszawa disaŭdigos malgrandan **Esp.-koncerton**, kiun plenumos s-ino Chmiel-Bieńkowska, operkantistino, kun pianakompano de s-o Wallek-Walewski, operdirektoro. Estos kantataj kelke da **Kristnasko-kantoj** en Esp. traduko. Antaŭos la koncerton mallonga prelego de s-o Tad. Hodakowski. **Komenco je la 22h.** Tempodaŭro 20 min. Ni petas plej varma sendi al **Polskie Radjo, Warszawa** kiel eble plej multajn dankskribojn. Sciigu pri la aranĝo viajn konatojn. **La ekzistado de Esp.-aranĝoj en la polaj radiostacioj dependas de subteno de la samideanaro.**

**Pluaj Esp.-disaŭdigoj** en polaj radiostacioj (Kraków, Warszawa) okazos la 7 kaj 21 de januaro, 4 kaj 18 de februaro, 3, 17, 31 de marto. Aŭtoroj kaj temoj: Prof. Dro Józef Reiss — Paderewski — muzikisto kaj patrioto. Dro Burdecki — Polaj eltrovaĵoj. Mgro Tadeusz Hodakowski — Universitatoj kaj superaj lernejoj en Polujo. Prof. Dro Odo Bujwid — Pasteur, Koch kaj Lister refomintoj de fundamentoj de la nuntempa medicino kaj enkonduko de iliaj instruoj en Polujon. Mgro Tad. Hodakowski — Marpleno da plej belaj legendoj polaj. Prof. Dro Odo Bujwid — Indikoj de Piłsudski por la Nacio (pensoj el „Skribverkoj kaj ordonoj“). Dro Adam Gadomski — Nekutimaĵoj de kuracakvoj en Pollando.

La vicorodo de la prelegoj ankoraŭ ne estas fiksita. Ĉiam aŭskultu la antaŭan por ekscii pri la venonta, ĉar povas okazi datŝanĝoj.

Kutima sendohoro 22h.45 ĝis 23h.

Radio-elsendoj en aŭ pri esperanto okazas ĉiutage. Ĉni povas peti detalojn kaj programojn al Radio Klubo esperantista de Francujo, 150, rue Crontevoye, Blanc-Misseron, Nord, FR., kiu plezure sendos sciigojn al ĉiuj samideanoj, — (poŝmarkon por respondo).

Al niaj abonantoj, legantoj kaj amikoj ni sendas tre korajn dezirojn ĝoje pasigi la **Kristnasko-festotagojn** kaj ĉion plej bonan en la Nova 1936 Jaro.

**La Redakcio kaj Administracio de Pola Esperantisto.**

Kun vera plezuro mi sciigas niajn legantojn, ke s-o **Tadeusz Hodakowski**, redaktanto de „Pola Esper.“, krom la posedata diplomo de magistro de filozofo, akiris diplomon de magistro de juro. Koran gratulon!

**Prof. Dro Odo Bujwid**  
Ĉefredaktanto  
de „Pola Esperantisto“.

El la tuta mondo, el oriento kaj okcidento, el sudo kaj nordo mi deziras ricevi taŭgan materialon por la gazetaro. Mallongaj artikoloj estas preferataj. Interŝanĝe mi sendas bonan materialon por la gazetaro en via lando. Mi certe respondas, se adreso legebla! Skribu tuj al s-ano **Walter P o p p e c k**, gvidanto de l' Gazetservo de GEA, en Wüstegiersdorf Schlesien, Germanujo.

### OBNIŻKA ABONAMENTU!

**Každy abonujący na rok 1936. miesięcznik „Pola Esperantisto“ wpłaca do dnia 31. grudnia 1935. tylko zł. 6.50. Po tym terminie abonament wynosi zł. 8 rocznie. Korzystajcie ze zniżki!**  
**Konto PKO 406.660.**

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1935, PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO No 406.660.**

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, L. UBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

